# tejo:aktuale

n°505 | Junio 2025

**Karaj abonantoj, rebonvenon. Jen via raporto pri la plej freŝaj novaĵoj de la TEJO-mondo**, kiu plenas je oportunoj kaj ĝisdatigoj pri niaj lastatempaj aktivaĵoj. Iĝu estrarano aŭ konfidencpersono: vi povos aŭdi ĉiujn novaĵojn (ne nur klaĉojn) eĉ pli ofte ol unufoje monate, kiel en la formo de la novaĵletero. Legu tiun ĉi numeron de **TEJO-aktuale**, kiu informas vin pri la novaj alvokoj, eventoj kaj aliaj novaĵoj en la TEJO-mondo.

## ALVOKOJ




### TEJO serĉas novajn estraranojn por la mandato 2025-2026 🌍✨

Jen via ŝanco aktiviĝi en TEJO kaj influi la estontecon de la organizo. Ĉu vi pretas efektivigi viajn brilajn ideojn? Iĝu estrarano!

📩 Sendu vian kandidatiĝon ĝis la **30-a de junio 2025** al elekta.komisiono@tejo.org.

🔗 Pliaj informoj estas en nia retejo.




### TEJO serĉas novajn konfidencperson(j)n

**La ideala kandidato**

- bone konas TEJO-n kaj ĝian funkciadon,
- ne havas alian postenon en la organizo,
- kapablas dialogi en multkultura etoso,
- pretas aktiviĝi kaze de bezono,
- estas bona aŭskultanto.

📌 Sciu ke ne estas aĝlimo! Kandidatiĝu ĝis la **31-a de julio**!

🔗 Legu pli en nia retejo.

### KER-ekzamenoj dum IJK 2025 kaj subteno de TEJO

Dum de la 81-a IJK en Cisarua, Indonezio,

okazos **skriba C1-nivela KER-ekzameno**.

📌 Individuaj membroj de TEJO povas ricevi repagon de 20€. Aliĝu al la ekzameno antaŭ ol kontakti TEJO-n por peti repagon.

📩 Kandidatiĝu ĝis la **13-a de julio 2025**! Retpoŝtu al edukado@tejo.org.

🔗 Aliĝu al la ekzameno ĝis la 30-a de junio ĉi tie.




## Kontribuu al la malferma filmeto de IJK 2025!

La unua azia IJK en pli ol jardeko, IJK 2025, tre baldaŭ venos! Ni apenaŭ povas atendi ĉi tiun neforgeseblan sperton.

Jen via okazo esti parto de historio! Ne gravas ĉu vi ĉeestos la kongreson aŭ ne, aŭ ĉu vi estas TEJO-membro aŭ ne. Aŭdigu al ni vian belan voĉon kaj montru vian entuziasman vizaĝon!

Ni atendos viajn filmetojn **ĝis la 20-a de julio**. Legu pliajn informojn en nia retejo.




# EVENTOJ

## Jam baldaŭ komenciĝos la Universala Kongreso en Brno!

Kio atendas vin dum la **junulara programo**?

- **Batikado** kun Anežka kaj Sam – alportu blankan T-ĉemizon aŭ alian ŝtofaĵon kaj kreu unikan buntan memoraĵon pri la UK!
- Ekskurso al loka **bierfarejo** – tie vi lernos pri bierproduktado kaj, kompreneble, gustumos la lokan bieron.
- Alia ekskurseto prezentos la kongresurbon el iom alia vidpunkto en la amuza "**Festo-tramo**".
- Dum la UK okazos la tradicia **futbala matĉo**.

**Ni serĉas trejniston** por la Esperanto-teamo! Kontaktu kongresoj@co.uea.org se vi pretas helpi.

Kontrolu vian retpoŝton por aliĝi al la ekskursoj kaj sekvu la UK-on en Instagram, Facebook kaj



[Telegram](#) por resti informita!

Kaj se vi ankoraŭ ne [aliĝis al la IJK, rapidu – la aliĝperiodo finiĝas la 30-an de junio](#)!




## Estu libera, estu kun naturo. Estu kun ni, en la montaro.

Daŭre eblas aliĝi al **[IJK 2025](#)** en Cisarua (Bogor), Indonezio de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto**!** Ne maltrafu la trian aliĝperiodon, kiu finiĝas ĝuste hodiaŭ, la 30-a de junio.

[Komencu vian aventuron](#)!

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**

# OKAZINTAĴOJ




## Dek TEJO-delegitoj sukcese gvidis rolludon, kiu faciligis profundajn konversaciojn pri lingvaj baroj kaj neegaleco

**Strasburgo, Francio** – En la majesta spaco de la Eŭropa Parlamentejo, kie ordinare resonas la voĉoj de politikistoj diskutantaj leĝojn kaj traktatojn, aŭdiĝis ĉi-foje io tute malsama: la entuziasmaj opinioj de junuloj el la tuta kontinento, kiuj partoprenis ludon nomatan “Kukumio” por esplori la kompleksajn temojn de lingvaj rajtoj, malplimultoj kaj socia neegaleco.

La ludo estis gvidita dufoje de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) en la Eŭropa Parlamentejo kadre de **Eŭropa Junulara Okazaĵo (EJO)**, 13-14 de junio, 2025. Jen la [ligilo](#) al la artikolo.




## Visibility in Action: Graphic design

Du oficistoj de TEJO, Albert kaj Severija, partoprenis la trejnadon "Visibility in Action: Graphic design", organizitan de Youth of European Nationalities. 🌍✨
La trejnado temis pri **grafika desegnado kaj inkluziveco**, montrante kiel dizajno povas esti potenca ilo por diverseco kaj alirebleco. 🙌



## Mia sperto en IJF

La TEJO-volontulo Korsako rakontas pri sia sperto en la **Internacia Junulara Festivalo**, okazinta dum la paska periodo en Torricella di Magione, Italio. Partoprenantoj ĝuis ekskurson al la insulo Polvese, interesajn prelegojn pri AI kaj eĉ la novkreitan vesperan programeron

"Tatrateknon".

Legu lian rakonton ĉi tie.




...




♈ Vi ne nur volas partopreni la kongreson — vi volas renovigi ĝin. Kun nova programo, nova nomo, kaj eventuale nova alfabeto. Ĉu iu petis tion? Kompreneble ne. Sed vi jam pretas prezenti viajn 64 paĝojn da skizoj pri “reforma, memsufiĉa Esperanto-kulturo”. Kelkaj admiras vin. Aliaj forlasas la babilĉambron.




♉ Julio donos al vi la ŝancon trankvile sidi sur herbejo kun ukulelo kaj prelegi al novuloj pri la glora epoko de papera *Kontakto*. Vi povos influi homojn ne per krio, sed per obstina afableco. Tamen, se iu denove diras “Esperantisto aŭ esperantulo?”, vi rajtas momente foriri kaj profunde spiri.




♊ Feliĉa**n** naskiĝmonato**n**, Ĝemelo! Vi jam planas du samtempajn projektoj**n**: retraduki *La Hobito* en klasika Esperanto *kaj* lanĉi TikTok-serio**n** pri internacia lingvopolitiko. Ĉu iu el ili finiĝos? Malverŝajne. Sed via entuziasmo inspiris almenaŭ tri homoj**n**, kaj unu el ili eĉ ĝuste uzis la akuzativo**n**.




♋ Vi retrovas iun malnovan foton de Vinilkosmo-festivalo kaj subite sentas, ke vi sopiras reeniri la spiriton de tiu epoko. Vi eble komencos skribi protestkantojn pri la forgesita gloro de la movado... aŭ pri la tragedio, ke oni plu mistraktas “ĉu” kaj “se”. Miksu nostalgion kun nuntempa saĝo — kaj bone venu via monato.

♌ Vi ricevos neatenditan inviton al Esperanto-evento kaj decidas aperi... en kompleta stilo: verda jako, steloforma




broĉo, kaj kvarminuta enkonduko pri via rolo en la movado de antaŭ dek jaroj. Ĉu tro? Ne por vi. Sed se iu demandos "Ĉu vi ankoraŭ estas aktiva?", simple diru: *"Mi estas la movado"*.




♍ Julio defios vin per testoj de pacienco: nepre vi trovos vin en kunveno, kie oni diskutados du horojn pri la koloro de afiŝo. Vi silentas, vi notas sed interne vi bolas. Provu almenaŭ unufoje direkti la diskuton al konkludo. Se ne eblas, lanĉu alternativan afiŝon tajloritan laŭ via stilo. Neniu haltigos vin.




♎Ĉi-monate vi estos la neoficiala movada terapeŭto. Vi trankviligas Zoom-brulantajn kunorganizantojn kaj prokrastemajn redaktorojn. Sed kiu trankviligas vin? La steloj konsilas: pasigu tempon kun vi mem kaj libro, eble *Gerda Malaperis*... sed kun la komentaĵoj de Bertilo, por ke vi sentu vin tamen utile okupata.




♏ Vi havos inspiron verki ion satiran pri la stato de la movado: poemojn, memeojn, aŭ eĉ imitan taglibron de Zamenhof, en kiu li bedaŭras inventi la lingvon pro retaj flamejoj. Via humuro trafas, sed tenu vin ĉe la limo inter "helpema kritiko" kaj "sovaĝa bruligo de pontoj". Alie vi denove finos en la silenta banlisto.




♐ Vi sentas vin vokata vojaĝi, eĉ se temas nur pri la kuirejo kun ŝultrosako plena de Esperanto-glumarkoj. Ĉi-monate vi konatiĝos kun nekonato el fora lando, kiu subite petas helpon pri loka kurso. Vi hezitas — sed akceptu. Eble vi ne ŝanĝos la mondon, sed vi certe havos anekdoton por la venonta podkasto.




♑ Vi denove volontulis por "nur malgranda tasketo" kiu nun manĝas vian tutan liberan tempon. Tipe. Sed fine vi ekkomprenos: estas tute akcepteble ne respondi retmesaĝon post la 23-a "ĉu vi ricevis ĉi tion?". Julion vi postvivos per pura persistemo kaj silenta kolerego – ĝis vi sukcesos ripozi en la ombro de nefinita raporto.




♒ Vi havas vizion por Esperanto en la jaro 2050, kun holografiaj kongresoj kaj universala prononcrekonilo. Ĉi-monate vi faros la unuan paŝon: reorganizi la dokumentaron de via grupo... per retrobot-programo. Iuj vin nomos freneza, aliaj profeta. Vi ĝuos ambaŭ. Nur atentu ne forviŝi la pasintjaran bilancon.




♓ Julio estos plena je sentemo. Vi revas pri pli komprenema, amikeca movado — sed ĉiuj ŝajnas kvereli pri la ĝusta traduko de “inclusive”. Vi eble emociigos grupon por kanti tradukitajn Björk-kantojn en Esperanto. Ĉu tio iel plibonigos la situacion? Ne. Ĉu vi sentos vin pli bone? Absolute.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands

INTUIT mailchimp